5-a Jaro
N-ro 3/4 (24.)

Oktobro 1930
*Aperas dumonate.*

# LA JUNA BATALANTO

Organo de la Internacia
Katolika Junulara kaj Paca Movado

ELDONATA DE

MONDJUNULARO KATOLIKA. MOKA

Redaktoro: WILHELM SOLZBACHER.

ENHAVO:

**Fr. W. Foerster,** La Fundamentoj de la Paco. — **Kaspar Mayr,** Prof. Walter Arnold † — **Wilhelm Solzbacher,** Ĉe la tombo de Prof. W. Arnold, honora prezidanto de MOKA. — **Petro Issaiv-Ivan Czerkavskyj,** La katolika movado en la ukraina universitata junularo. — **Mstislav Vjatiĉ,** Atestoj de « Sendiulo » pri « sukcesa » ateista propagando. — **M. Stonis,** Grandioza kongreso de la litova katolika studenta asocio «Ateitininkai». — **J. M. Hashimoto,** El la japana junularo. — **P-ro A. Dombrovski,** Letero al La Juna Batalanto. — **Internacia Junulara Agado,** I-a parto : Katolika Junularo. — **P. Cyrill Fischer O. F. M.,** Bolŝevista junulara movado. — **Carnets de l'AUCAM,** Moderna literaturo en Finnujo. — **Nia Movado.** — **Leterkesto.** — **El la Esperanto Movado.** — **Sur nia librotablo.**

**Bildo** : Prof. Prel. A. Dombrovski en lia laborĉambro.

REDAKCIO: **Köln, Dagobertstrasse, 28, Germ.**

Eldonejo: ELDONA KOOPERATIVO LA JUNA BATALANTO,
Köln—Dellbrück, Bensberger Marktweg 63, Germ. (Regina Reiff).

# Abonprezoj de “ La Juna Batalanto „

Normala abonprezo : jare 2 germanaj markoj, kun MOKA-membreco 3 M. La eldonejo akceptas monbiletojn, ĉekojn, poŝtmandatojn, respondkuponojn, germanajn poŝtmarkojn.

| Lando | jara abono | kun MOKA-kotizo | simpla kotizo | Lando | jara abono | kun MOKA-kotizo | simpla kotizo |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Anglujo | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Hungarujo | 2.4 p | 4 p | 2 p |
| Argentino | 1,50 p | 2 p | 1 p. | Italujo | 9 l | 14 l | 5 l |
| Azio | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Japanujo | 2 s | 3 s | 1 s 3 d |
| Aŭstralio | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Jugoslavujo | 30 din. | 40 d | 15 d |
| Aŭstrujo | 3,40 s | 5 s | 2 s | Litovujo | 5 lit. | 7 l | 3 l |
| Belgujo | 3,50 b | 6 b | 2 b | Luksemburgo | 18 fr | 25 fr | 10 fr |
| Brazilio | 4 mr | 5 mr | 2 mr | Meksiko | 0,50 dol | 0,75 d | 0,30 d |
| Ĉeĥoslov. | 16 kr | 20 kr | 10 kr | Nederlando | 1,25 fl | 2 fl | 0.80 fl |
| Danujo | 2 kr | 3 kr | 1 kr | Polujo | 4 zl | 6 zl | 3 zl |
| Danzig | 2 g | 3 g | 1,20 g | Portugalo | 8 esc | 12 e | 5 esc |
| Francujo | 12 fr | 18 fr | 6 fr | Rumanujo | 80 lei | 100 l | 40 lei |
| Germanujo | 2 M | 3 M | 1.20 M | Svedujo | 2 kr | 3 kr | 1 kr |
| Grekujo | 38 dr | 50 dr | 15 dr | Svisujo | 2,50 fr | 4 fr | 1,50 fr |
| Hispanujo | 3 p | 4,50 p | 2 p | Usono | 0,50 dol | 0,80 dol | 0,30 dol |

Ni akceptas ankaŭ pagojn por duona jaro aŭ kelkaj jaroj. Membroj de MOKA ricevos nian jarlibron kaj aliajn publikigaĵojn. Donacoj por la subtena kaso (liverado de J. B. al malriĉuloj) estas invitataj.

*Abonejoj :* Krom al la eldonejo oni povas ankaŭ pagi al la naciaj sekretarioj de MOKA.

*Poŝtkontoj.* Germanujo : Köln 480 37 (Wilh. Solzbacher, Köln) ; Francujo : Strasbourg 8180 (P. I. A. Muffang, Bourg-la-Reine); Aŭstrujo: Wien D 12.017 (Katholisches Kreuzbündnis für Oesterreich, Ortagruppe Heiliges Feuer).

**POR PROPAGANDI NIAJN IDEOJN** en la katolika junularo tutmonda, MOKA eldonas propagandgazetojn nacilingvajn. Ili devas enpenetri ĉie en la rondojn kaj asociojn. Ĉiu propagandisto portu daŭre kvanton en sia poŝo, por disdoni aŭ disvendi ilin.

« **ERWACHENDE JUGEND** » nomiĝas la **germanlingva** bulteno aperanta dumonate. Jara abonprezo : 1.20 RM. Propagandcele (sed oni tiam nur forsendas minimume 25 ekz.) ĝi kostas po ekzemplero **nur 3 feningojn!** Eldonejo : Verlag Erwachende Jugend, **Werl** (Kr. Soest), Germ.

« **LA JEUNESSE MONDIALE CATHOLIQUE** » **estas** destinata por niaj **franclingvaj** amikoj kaj kostas **nur 1 francan frankon** por 10 ekz., 4 fr. por 50, 7 por 100 ekz. Mendu tuj !

**En angla kaj hispana lingvoj** similaj bultenoj estas nun preparataj. Interesuloj jam nun mendu ĉe la Eldona Kooperativo J. B. aŭ ĉe la kompetenta nacia sekretariejo.



# La Fundamentoj de la Paco

De Friedrich Wilhelm Foerster.

La liberpensulo kaj sociologiisto Auguste Comte legadis ĉiuvespere en la libreto de Thomas a Kempis pri la Imitado de Kristo; li opiniis tiun libron vojmontranto kaj edukanto por homoj ĉiukredaj, kiuj vere klopodas, por per la ĝusta memekkono kaj interna disciplino suprenlevi sin mem el la nura natura stato, kiu signifas la eternan militon de ĉiuj kontraŭ ĉiuj, en staton vere sociokapablan. Oni legu la sekvontajn vortojn de Thomas a Kempis kaj demandu sin, ĉu tio ne estas monumentaj vortoj, sen kies kom preno ĉiu paca agado pendas en la aero kaj la nevidebla milito tiom longe kaŝbruletas sub ĉia ekstera ordo, ĝis kiam ĝi unu tagon eksplodos en malkaŝaj flamoj kaj metos sian sangan realecon al la loko de la pacmensogo kaj de ĉiu alia speco de mensogita civilizo. Tie estas skribite en la ĉapitro « de bono homine pacifico » (« pri la bona homo pacema ») :

**« Unue metu vin mem en la staton de la paco — tiam vi povos doni ĝin ankaŭ al aliaj.**

**Homo paciganta valoras pli multe ol scienculo.**

**Homo regata per siaj pasioj turnas eĉ la bonon en malbonon kaj volonte kredas la malbonon.**

**Homo vere pacema ĉion direktas al la bono.**

**Tiu, kiu vere estas en paco, suspektas neniun, sed tiu, kiu estas malkontenta kaj konfuza, estas tien- kaj reen-puŝata per ĉiam nova suspekto; li estas sentrankvila kaj ne toleras, ke aliaj estu en trankvilo. Li ofte diras tion, kion li ne rajtus diri, kaj forgesas tion, kion li devus fari.**

**Li volonte konstatas, kion la aliaj devas fari, kaj malzorgas tion, kion li mem devus realigi. Do unue turnu vian fervoron al vi mem kaj nur poste al via proksimulo.**

**Rapide vi trovas senkulpigojn por vi mem, por plibeligi viajn proprajn agojn, sed senkulpigojn de aliaj vi ne volas akcepti.**

**Kaj tamen estus sole juste, kulpigi vin mem kaj senkulpigi vian fraton. Toleradu la aliajn, se vi volas, ke oni toleradu vin !**

**Meditadu pri tio, kiom malproksimaj vi ankoraŭ estas de tiu vera amo kaj humileco, kiu ne indignas kaj protestas, escepte pri si mem.**

**Ne estas granda afero, bone interrilati kun bonaj kaj mildaj homoj; tio plaĉas al nia natura homo, ĉiu ŝatas pacon kaj preferas la samspeculojn. Sed vivadi en paco kun rigidkapuloj, obstinuloj, senorduloj kaj maliculoj, tio estas granda graco, brava laboro kaj inda de altaj honoroj.**

**Ekzistas homoj, kiuj tenas sin mem en paco kaj kiuj tial ankaŭ vivas en paco kun la aliaj.**

**Kaj ekzistas aliaj, kiuj mem ne havas pacon kaj tial ankaŭ la aliajn ne lasas en paco; ili fariĝas pezaj al la aliaj, sed eĉ pli ili pezas sur si mem. Tiu, kiu plej pacience scias toleri suferadon, havos la plej grandan pacon; li estas venkanto super si mem kaj estro de la mondo, amiko de Jesuo Kristo kaj heredanto de ĉielaj ĝojoj. »**

Ĉi tiuj vortoj de Thomas a Kempis ne rigardas sole la religian homon, ili koncernas la fundamenton de la homa socio, la plej konkretan ŝtataneCan edukon, la plej gravan sociigon de la kontraŭsocia homa naturo. « Pacifismo » ne estas ia parta laboro de la homa kulturo; ne, en ĝi konsistas la fundamento de ĉiuj fundamentoj, sen kiu ĉio alia restas ŝajno kaj mensogo;

ĉi tie temas pri la plej simpla kaj plej malfacila afero en ĉiu familia mastrumado, en ĉiu kolegaro, en ĉiu oficejo, en ĉiu kunordigo de kontraŭaj inklinoj, interesoj, tradicioj : la alispecajn kaj alidirektajn aferojn inde toleri kaj konduki al pli alta unueco. Profunde en ĉiuj kuŝas la milito, la envio de Kain kontraŭ Habel, la ĵaluzeco de Saŭlo kontraŭ Davido, la furiozeco kontraŭ la fremda volo detruanta niajn intencojn, la mordanta netoleremo de ĉiu vivantaĵo kontraŭ tiu, kiu portas aliajn kolorojn kaj plumojn, la tuta tragiko de la nekompreno kaj falskompreno — tial homa socio devas ĉie komenciĝi per tio, kion Thomas a Kempis postulas; sole ĉi tie estas reale « organizo » kaj « sociigo » — tiu, kiu ĉi tiun taskon forgesas, prokrastas aŭ mokas, tre baldaŭ ekvidos, kiel la nebridita demoneco de homa malamikeco eksplodiĝos ĉiujn liajn laborojn.

---

# PROF. WALTER ARNOLD †

**Heroa homo, admirinda, senlaca pioniro de la katolika agado nacia kaj internacia, karega amiko, ĉiam grandanima, ĉiam helpema, ĉiam oferema, forlasis nin, por foriri el ĉi tiu tero plena de sufero kaj malpaco en la regnon de la eterna lumo kaj triumfo. Humila servanto de Dio, ĉiam modesta, ĉiam plena de espero kaj konfido je la fina helpo de la ĉiopova ĉielpatro, li ĝojege oferis sian junecon, sian forton kaj energion, la grandajn riĉaĵojn de sia spirito kaj sian tutan teran posedaĵon ĝis persona memvola malriĉeco por la venko, por la triumfo de la Sankta tutmonda Eklezio, por la glora realiĝo de la Dia regno, por la paco de Kristo, por la efika kunagado de la tutmonda katolikaro.**

**Depost la unuaj tagoj de la fondo de Internacio Katolika (IKA) li estis kun ni, kiel membro de la prezidantaro, kiel direktoro de la movado en Svisujo; li kunhelpis dum multaj jaroj por ebligi la disvastigon de niaj ideoj en pli ol 20 landoj. Li ĉeestis ĉiujn kongresojn de IKA, ĝis kiam 1925 la senlaca agado detruis la forton de lia korpo. Li fondis la internacian sekcion de la katolikaj instruistoj. Sed lia espero, lia plej granda ĝojo estis la Mondjunularo Katolika, kies prezidanto li estis dum kelkaj jaroj kaj kies honora prezidanto li restis ĝis sia tro frua morto.**

**Karega amiko, jes — vi permesas diri — karega kunfrato, viaj disĉiploj ne nur el Svisujo, sed el ĉiuj partoj de la mondo staras nun ĉe via tombo, plenaj de malĝojo. Sed antaŭ ĉi tiu via tombo ni donas al ni denove la manojn — ni ĉiuj el ĉiuj landoj de la vasta mondo —, por solenege promesi : Ni estas pretaj kaj decidintaj, batali por la fina venko de la sanktaj ideoj, por kiuj vi en heroa ofero fordonis vian junan vivon! Ni scias, ke vi, kronata nun post longa milito kaj sufero de la eterna Princo de la Paco per la krono de la venkinto, estos kun ni kiel heroa portanto de nia glora porpaca standardo!**

**Antaŭen, fratoj, al la fina venko!**

**Kaspar MAYR,**
**Membro de la IKA-prezidantaro.**

---

**NUR 30 GEAMIKOJ sendis ĝis nun sian pagon por la JUBILEA KOLEKTO, kiam sekvos la aliaj ?**

---



# Ĉe la Tombo de Prof. Walter ARNOLD Honora Prezidanto de Moka

**Nur 42-jara li mortis, oferinte sanecon kaj posedaĵon, sian tutan vivosorton, en la servo de nia movado, en la laborado de la Katolika Agado kaj en la internacia organizado de la katolikaj fortoj. Malmultaj scias, kion li kaj lia pionira laboro signifis en la historio de la internacia katolika movado, kaj ankoraŭ ne venis la tempo, por detale skribi pri tio. 1925 kruela katastrofo detruis lian sanecon kaj fortecon, kaj de tiam nur plu lia suferado kaj preĝado estis kun ni.**

**Li havis vaste malfermitan, universale sentantan katolikan koron. Kiam li en sia juneco studis afrikanajn negrolingvojn kaj korespondadis kun la sankteca grafino Ledochowska, fondintino de la Petro-Klaver-Sodalicio, aŭ kiam li dum du jaroj (1907-1909) studis kaj instruis en Warszawa, konatiĝante kun la suferoj kaj zorgoj de la polaj katolikoj sub la tiama rusa regado, aŭ kiam li en la Instruista Seminario de Sankta Miĥaelo en Zug estis la amiko kaj gvidanto de siaj lernantoj, kiuj venis el ĉiuj partoj de Svisujo kaj havis kvar malsamajn gepatrajn lingvojn, aŭ kiam li kunlaboris en la organizado de la svisa katolika instruistaro kaj klopodis enordigi ĝin en pli vastan internacian kaj tutmondan kadron, aŭ kiam li laboris por la enkonduko de Esperanto en la katolikajn rondojn, aŭ kiam li persone konatiĝis kun Prof. Fr. Wilhelm Foerster kaj penis realigi ties pedagogiajn ideojn en sia profesia laboro, aŭ kiam li kiel prezidanto de IKA, fondinto de ĝia instruista sekcio kaj kiel aktiva prezidanto kaj posta honora prezidanto de MOKA alvokis la katolikaron ĉiulandan al aktiva kunlaboro, kristana repaciĝo kaj katolika frateco, kreante por ili praktikajn helpinstituciojn, — ĉiam lia agado estis laboro por la realigo de la Reĝeco de Kristo en ĉiuj rilatoj de la publika kaj privata vivo.**

**Laŭ sia tuta karaktero li estis libera filo de la libera Svisujo. Li ne estis radikalulo en siaj vortoj, sed sub lia ĝentila, afabla, nobla eksteraĵo kaj sub liaj modestaj, prudentaj, pedagogie pesitaj vortoj vivis energia, kuraĝa, altencelanta pionira animo. Li malamis la katolikan dormemon, malkuraĝon, nur defendeman timon. Li vokis al apostola antaŭenpuŝado.**

**Inter la svisaj katolikoj lia nomo havis bonan sonon. Li estis estrarano de la Katolika Instruista Asocio, li estis fondinto (1915) kaj prezidanto de la Baumgartner-Societo, kiu laŭ la ekzemplo de la granda katolika pedagogiisto Heinrich Baumgartner devis servi la formadon de karakterfortaj, science kompetentaj kaj apostolspiritaj katolikaj instruistoj en la Libera Instruista Seminario (Akademio) en Zug. En tiu akademio li estis profesoro de pedagogio kaj geografio, dum longa tempo ankaŭ vicprefekto kaj membro de la direktoraro. kaj 1919 li publikigis bonegan historion de sia instituto. Kiam do profesoro Arnold kunfondis nian movadon kaj batalis en ĝiaj unuaj vicoj, tio multe signifis por nia enpenetro en Svisujon. Eble eĉ tro multe ĝi signifis. Ĉar depost kiam li ne plu povis aktive labori kun ni, nia helpo el lia lando fariĝis treege nesignifa...**

**Multege devis danki al li la junularo, kiu studis en lia instituto. Li estis patra amiko kaj kara helpanto de siaj lernantoj. En sia pedagogio li estis grandparte sekvanto de Friedrich Wilhelm Foerster, kun kiu li konatiĝis en Zürich kaj kies librojn li unuavice utiligis. Eble ties fanatika kaj heroa amo al la internacia kaj sociala justeco kaj paco ankaŭ multe influis liajn ideojn pri la internacia vivo.**

Pri la internacia katolika agado li havis grandajn esperojn kaj kuraĝajn planojn. Kaj por ili li senĉese laboris kaj batalis, streĉante ĉiujn siajn fortojn... ĝis la katastrofa detruiĝo de lia saneco. Kiel afergvidanta prezidanto de IKA li preskaŭ superhome laboradis, multe pli en la sekreta silento ol antaŭ la okuloj de la homoj, kaj en krizaj tempoj li estis la trankvila kuraĝa helpanto. Kiam 1924 la translokiĝo de la IKA-sekretariejo de Graz al Svisujo estas decidita kaj la unua intenco, iri al Genève, malebliĝis, li akceptis la IKA-sekretariejon en Zug, preparante kaj ordigante ĉion. Ho, mi ankoraŭ bone rememoras tiun dometon malantaŭ la instituto de Sankta Miĥaelo en Zug, kie tiam ĉefsekretario Kaspar Mayr kaj Msgr. D-ro Nikolaus Pfeiffer laboradis, kaj kie mi ankaŭ je la lasta fojo vidis profesoron Arnold, ne sciante, ke jam baldaŭ lia helpo devos manki al ni...

En la MOKA-movado li kunlaboris depost ĝia komenco. Li gvidis la laboron en Svisujo kaj faris en la MOKA-Kongreso de Graz (1921) la ĉefparoladon pri « la senco de internacia katolika junulara movado ». De 1921 ĝis 1923 li estis aktiva prezidanto de MOKA, 1923 la kongreso de Konstanz elektis lin reprezentanto de MOKA en la IKA-prezidantaro. 1924, kiam nia unua honora prezidanto Prelato kaj Deputito D-ro Aleksandro Giesswein (Budapest) estis mortinta, li estas elektita honora prezidanto de MOKA. Kiom multege li faris por ni en la unuaj tempoj, enkondukante nian movadon en plej diversaj rondoj, organizante rondvojaĝojn de la tiama ĉefsekretario Hanns Sappl, zorgante pri monaj aferoj, ebligante la eldonon de niaj unuaj eldonaĵoj, monsubtenante malriĉajn MOKA-anojn, por ebligi al ili partoprenon je la kongresoj, ĉio ĉi tute ne estas estimebla de iu, kiu ne mem travivis ĝin. De 1925 li preskaŭ nenion plu povis fari. 1926 li subskribis nian alvokon « Katolika Junularo kaj Esperanto », 1929 lia subskribo estis sub la letero de MOKA al la Sankta Patro, salutkartoj kelkfoje flugis inter lia domo kaj la MOKA-oficejo,...tio estis ĉio.

Kaj nun jam ni spirite staras ĉe lia tombo, denove perdinte unu el niaj plej bonaj amikoj. El tiuj gvidantoj, kiuj ankoraŭ en la granda publika MOKA-demonstracio okaze de la kongreso de Konstanz (1923) paroladis al ni, nun preskaŭ neniu plu vivas : Prelato Giesswein, la pioniro de la katolika frateco, jam kelkajn monatojn poste estas vokita en pli bonan mondon; episkopo Fischer-Colbrie de Košice, kiu tiam entuziasmigis nin per sia voko al heroa junulara batalo, ne plu estas inter ni, kaj mi surgenuis antaŭ kelkaj semajnoj ĉe lia tombo, kien la vilaĝanoj pilgrimas kiel al sanktulejo, legante supre lian devizon « Pauperibus evangelizare misisti me » (Por alporti la evangelion al la malriĉuloj, vi sendis min!); kaj nun ankaŭ jam la prezidinto de la tiama kunveno Prof. Arnold por eterne foriris de ni...

Unu el la plej spertaj gvidantoj el la internacia katolika laboro skribas al ni : « Nur tre malmultaj homoj scias pri la interna kaj ekstera sufera historio de tiu heroa homo, kiu ankoraŭ havis la kuraĝon, voli ion novan kaj grandan, kaj kontraŭ sia espero forlasita de ĉiuj, fine rompiĝis, sed restis heroa ĝis la lasta momento. Certe ankaŭ li havis siajn malperfektaĵojn, sed el la multaj kuraĝaj voĉoj, kiujn mi ekkonis en mia vivo, li estis unu el la plej noblaj kaj malegoistaj. Li fariĝis ofero de la katolika miopeco, bagatelemo kaj indiferenteco... » — Hanns Sappl (München), kiu kiel ĉefsekretario de MOKA dum longa tempo kunlaboris kun Prof. Arnold en la estraro de nia movado, skribas : « Preskaŭ nekredeble, ke li jam mortis! Homo en la plej belaj jaroj de la vivo, senlaca kaj fervora ano de nia movado. Mi multe ŝuldas al li! » — Kaj Pastro Joseph Schaelin (Zug), rektoro de la Instituto de Sankta Mihaelo skribas: « Kiel amiko kaj kiunlaborinto de la kara mortinto mi tre bone scias, kun kia sindono kaj nedetruebla idealismo li estis kunligita kun MOKA! »



La ideo, por kiu li bataladis, ne mortis. Ni, MOKA-anoj, portas ĝin. La standardo, kiu falis el liaj manoj, ne perdiĝas. Ni tenas ĝin. La amo kaj fideleco ne pereas. Ni ne forgesos lin! Ses unu aferon ni volas lerni de li: Se nia movado ne volas resti nura epizodo pasanta, sed volas esti forto en la transformado de la mondo, tiam ni bezonas homojn, kiuj oferas ne nur kelkajn liberajn horojn kaj kelkajn frankojn, sed kiuj estas pretaj, dediĉi sian tutan vivosorton al nia movado, kiuj povas vivi kaj morti por la granda ideo — kiel Walter Arnold.

W. S.

# La Katolika Movado en la Ukrajna Universitata Junularo

De **Petro Issaiv** (Lviv), Esperantigis **Ivan Czerkavskyj**

La Juna Batalanto okupiĝos estonte en speciala maniero pri la katolika junularo de orientritaj popoloj. Ni komencas tiun agadon per serio de informaj artikoloj. Jen la unua pri la ukrajna junularo. Sekvos aliaj pri la rumana kaj armena, espereble ankaŭ pri la siria, kopta, maronita, malabara ktp. katolika junularo. — La ĉefurbo de Orienta Galicio en ĉi tiu artikolo estas skribata laŭ ukrajna maniero « Lviv ». En pola lingvo ĝi nomiĝas « Lwôw », kaj eble aliaj legantoj nur konas ĝian nomon germane (Lemberg), france (Léopol) aŭ angle (Lvov). Red.

La organizita katolika movado en la ukrajna universitata junularo de Orienta Galicio (Polujo) komenciĝis en la jaro 1918. Tiam sub gvido de pastro Josafat Markevyĉ, basiliana monaĥo kaj doktoro de teologio, estiĝis en Lviv la unua ukrajna *Mariana Sodalicio* por la universitata junularo. Sed bedaŭrinde ĝia disvolviĝo estas interrompita per la disfalo de la aŭstra-hungara imperio kaj per la liberecmilito de la ukrajnoj. Ĉiuj kapablaj kaj sanaj en la ukrajna junularo iris tiam sub la batalstandardojn. La nacia katastrofo, kiu sekvis pro interna malforteco kaj ekstera armita okupo de la okcidentukrajna lando elvokis en la nova generacio novan senton pri la spiritaj kaj moralaj valoroj. La ukrajna junularo deturnis sin de socialismo, primitiva demokratismo kaj religia indiferenteco, kiuj ĝis tiu tempo estis modaj en ukrajnaj intelektulaj rondoj, kaj turnis sin tutkore kaj viglanime al la unika fonto de vivdonaj fortoj, t. e. al la Eklezio de Kristo. La Mariana Sodalicio de ukrajnaj studentoj reviviĝis; ĝi posedas sian propran organon, monatan revuon « *Postup* » (« Progreso »). Sed tiu movado renkontis novajn barilojn kaj malfacilaĵojn sur sia vojo kaj ne povis pli vaste disvolviĝi. Tiutempe la plimulto de la universitataj studentoj estis batalantaj por ukrajnaj alternejoj, kaj tiuj bataloj elĉerpis ilian tutan energion kaj ilian tutan entuziasmon.

1925 fondiĝis en Lviv la « *Ukrajna Kristana Organizaĵo* » (U. K. O.), por fortigi la religian vivon kaj defendi la katolikan Eklezion. En la sama jaro estas fondita en tiu asocio sekcio por universitataj studentoj, kaj ĝi ekzistis ĝis novembro 1929. Tiam membroj de la sekcio, dezirante sendependigi la katolikan studentan movadon de certaj polemikoj kaj de tiu asocio, kiu intertempe komencis servi apartajn celojn de unu pastrara partio, fondis anstataŭ la studenta sekcio de la U. K. O. Iniciatan Rondon por fondo de sendependa societo de la ukrajna katolika universitata junularo. Sekve de tio oni fondis en Lviv la 27-an de marto 1930 dank' al la klopodoj de la suprecitita Iniciata Rondo la *Societon de la Ukrajnaj Katolikaj Studentoj «Obnova»* («Renovigo»). Msgr. Andreo *grafo*

## J A P A N U J O.

*Sukcesa somerkurso por la katolika junularo — vizito en la hospitalo por lepruloj — malnovaj superstiĉoj — memmortigoj — modernaj tendencoj en la japana junularo.*

Komence de la pasinta monato mi partoprenis somerkurson gviditan de Pastro Iwashita, kiu okazis ĉe la piedo de la Fuĵi-Monto (Fuĵijama) dum tuta semajno, por akceli nian katolikan junularon. Iutage ni 40 membroj, inter ili ankaŭ kelkaj junulinoj, vizitis la hospitalon por lepruloj de Fukusei, tute proksime ĉe la Fuĵi-farmo de Pastro Iwashita.

La estro de tiu hospitalo estas Pastro Deloir de Bezet, kiu estas jam 82-jara. Antaŭ nelonge (la 10 aŭgusto) Lia Imperiestrina Moŝto Dowager donacis al li florbukedon kaj monsubtenon por lia instituc̈io. Oni diras, ke la imperiestrino persone elektis la florojn en sia ĝardeno, por fari el ili bukedon honore al tiu fremda bonfaranto naskiĝinta el nobela familio en Francujo. En la hospitala kapelo okazis sakramenta beno kaj preskaŭ 60 gelepruloj, junaj kaj maljunaj, viroj kaj virinoj, kantis siajn kantojn tiel bele kaj el tiel profunda koro, kiel iliaj voĉoj povis leviĝi ĉielen. Tio estis por ni profunde emociiga momento... Antaŭ ol eniri la hospitalan pordegon, mi estis sentinta iom timeman atenton, sed poste mi preskaŭ ploris larmojn, pensante pri tiuj bedaŭrinduloj, por kiuj oni povus uzi la vortojn de Dante: « Vi enirantaj lasu la esperon...... »

La programo de la somerkurso, pri kiu mi jam parolis, enhavis jenajn paroladojn :

Spirita kontemplado kaj liturgio (D-ro T. Noda S. J., direktoro de la Granda Seminario de Tokio); La katolika doktrino pri modernaj problemoj: laboro kaj kapitalo, edzeco, limigo de la naskoj, edukado (Prof. S. Iwashita); la katolika sociala vidpunkto pri la naturrajto kaj ĝiaj rilatoj al la nuntempa juro (D-ro K. Tahaka, Prof. en la Imperia Universitato de Tokio): Sankta Augustinus (Prof Oba); Studo pri la encikliko Rerum Novarum (Prof. Kobayashi). — Post la fino de la kurso mi vizitis survoje al Tokio la Hospitalon de Sankta Terezio en Kamakura, Beach, kiu komencas altiri al si la atenton de la mondo...

Malantaŭ nia domo estas monto, laŭ sia alteco la dua en ĉi tiu distrikto kaj kun kojna formo kiel la Fuĵi-Monto, kaj sur ĝia supro troviĝas sanktejo kun kesto enhavanta «sanktajn korpojn », du spegulojn kaj glavon. Dum tuta semajno en aŭgusto estis tie granda festo, kaj multaj fanatikaj kredantoj suprengrimpis la monton por adori kaj rigardi la leviĝon de la suno. Ili portas blankajn vestojn kaj supreniras sur vojo, kiun oni nomas « Rokkon Shojo », t. e. « la puraj sen radikoj de la malbonoj ».


La monta lago havas grandajn falojn, 140 metrojn profundajn, kaj ĝi estas famkonata kiel loko de memmortigoj. Dum mia tiea restado ne malpli ol 30 tiaj bedaŭrindegaj viroj kaj virinoj jetis sin malsupren la akvofalojn; eble la « malbona tempo » estis la kaŭzo.

Mi vidis la prezentadon de la famkonata filmo « En okcidento nenio nova ». Ĝi kaŭzis grandan sensacion inter la junularo de Tokio. Kiel vi scias, ĝi estas superrealista literaturaĵo, kaj nun inter japanaj junuloj kaj junulinoj tia naturalista kaj « proletaria » literaturo estas tre ŝatata, same kiel erotikaj filmoj. Krom tio multaj studentoj kunlaboras en la Studasocio por Socialaj Sciencoj kaj aliĝas al la sociala kaj socialista movadoj......

25 aŭgusto 1930, J. M. HASHIMOTO, TOKIO.

**D O R M U B O N E,** **se vi jam pagis vian abonkotizon! Se ne, — rapide sendu ĝin al la eldonejo!**





**Prof. Prelato A. Jakŝtas Dambraŭskas (Dombrovski) en sia laborĉambro.**
Bedaŭrinde pro teknika kaŭzo la bildo ne jam povis aperi en la pasinta numero.

## Letero de Prof. Prel. Dombrovski

Responde al nia lasta numero, kiun ni estis dediĉintaj al li okaze de lia 70-a naskiĝtago, ni ricevis de Prelato Dombrovski leteron, en kiu li korektas kaj pliprecizigas kelkajn datojn kaj dirojn. Ni opinias nia devo, publikigi tiun leteron. Ni uzas la okazon por deziri al Prelato Dombrovski, kiu laŭ sciigo de alia litova amiko nun troviĝas en eksterlanda resanigejo, baldaŭan kaj kompletan resaniĝon !

Red.

...En la 2 (23)-a numero de via tre ŝatata «Juna Batalanto» vi estas oferinta al mia modesta persono multe pli da loko ol ĝi meritas. Ĉiu troigo estas ĉiam danĝera, ĉar pli aŭ malpli kontraŭas al vero. Ŝatante la veron en ĉio, mi sentas mia devo, montri kelkajn malprecizecojn ankaŭ en via bela artikolo :

1. Mia naskiĝvilaĝo nomiĝas ne Kuroniai, sed **Kuronys.**
2. La tago de mia pastriĝo estas la 29 de junio 1889, ne la 29 de aprilo.
3. Prezidanto de S. Kazimira Eldona Societo mi fariĝis 1906, ne 1907, kiel vi skribis.
4. De 1929 mi ne estas plu membro de la Esperantista Akademio.
5. De 1927 mi ne estas plu prezidanto de Litova Esperanto-Asocio (se mi ne eraras).
6. Miaj meritoj en la eldonado de la studenta jurnalo «Ateitis» estis tre modestaj, ĉar la monon donis la S. Kazimira Societo, la artikolojn verkis la «ateitininkaj» mem. Al mi restis nur zorgi, ke en «Ateitis» ne aperu artikoloj de duba katolikeco.

Charles proponis la fondon de Katolika Asocio por la Kunlaboro inter la Rasoj. Tiu propono estas akceptita, kaj **barono Descamps** (konata kiel prezidanto de la Kristana Instituto por Internacia Juro), **Prof. Pastro Charles** kaj **Pierre Rijkmans** estas elektitaj kiel provizora komitato.

**Internacia Universitatana Misia Kongreso** okazis ankaŭ komence de septembro en **Ljubljana** (Jugoslavujo), daŭrigante la laboron de la antaŭaj grandiozaj kongresoj de Poznan (1928) kaj Mœdling (1929). Laŭ la nombro de la partoprenantoj ĝi ja tute ne estis komparebla al la antaŭaj kunvenoj, sed ĉeestis pastroj kaj junuloj el multaj landoj (ankaŭ kelkaj el niaj amikoj). La kongreso multe utilis la katolikan misian movadon inter la studentoj de la sudslavaj nacioj.

**Pax Romana**, internacia ligo de katolikaj universitataj studentoj, havis sian nunjaran (16-an) internacian kongreson en **Muenchen** (Germanujo), ĝin preparis la lastjara prezidanto de P. R., **D-ro Martin Luible**. De de la 27 aŭgusto ĝis la 3 septembro kunvenis delegitoj el Anglujo, Aŭstrujo, Ĉeĥoslovakujo, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Hungarujo, Irlando, Italujo, Jugoslavujo, Litovujo, Nederlando, Polujo, Rumanujo. Svisujo. Krom tiuj eŭropaj landoj eĉ Afriko estis reprezentita per alĝeria delegitaro. En la solena malferma diservo **Kardinalo Faulhaber** predikis pri la temo «Vox temporis vox Dei» («la voĉo de la tempo estas la voĉo de Dio»), montrante, ke la postuloj de nia tempo estas homamo, internacia paco, spirita-religia renoviĝo. En Muenchen oni speciale diskutis pri praktikaj labortaskoj. Oni volas nove organizi la studentinterŝanĝon. Cetere jus antaŭ la kongreso estis aperinta la bonega internacia manlibro de PAX ROMANA. Oni akceptis proponon, ke estonte ĉiu kongreso havu klare difinitan specialan programon. La ĉefparolantoj en Muenchen estis Pastro Profesoro D-ro **Steffes** (Münster, antaŭe Nijmegen) kaj Pastro **Lange O. S. B.**, partoprenis la kongreson krom Lia Kardinala Moŝto ankaŭ la papa nuncio.

**Ĉu JUVENTUS CATHOLICA reviviĝos?** De post pli ol tri jaroj tiu unuiĝo de la grandaj asocioj de la vira junularo dormadas, ĝia sekretariejo estas mortinta. En la organo de la Katolika Junularo de Germanujo «Stimmen der Jugend» **Georg Wagner** alvokas por ĝia revivigo: «Tri jaroj pasis. Kaj intertempe la Juventus Catholica apenaŭ laboris. Tamen feliĉe la internaciaj rilatoj de la katolika junularo ne malpliiĝis. Precipe **Mondjunularo Katolika** (MOKA) faris bonan laboron. Sed ja la parta malsukceso de la internacia kongreso lastjare organizita de MOKA en Barcelona montris ankaŭ la limojn de la MOKA-agado kaj aliflanke la nepran necesecon, **reaktivigi la Juventus Catholica**. Nun ŝajnas esti tempo **refondi** ĝin. Al tio ni alvokas. Ni scias, ke ni voko ĉie trovos esan ehon. **Taskoj** al la Juventus Catholika ne mankos. Mi nur nomu la taskon de la reciproka interrilatigo. Kion scias la katolikaj junularoj de la mondo unu pri la alia? Kion scias la katolikaj junularaj asocioj de Eŭropo pri la katolika junularo de Germanujo kaj alterne? Kion ni scias pri la suferoj kaj bataloj de la katolika junularo en kelkaj eŭropaj landoj, ekz. en Jugoslavujo, kie per la reganta Beograda militista diktatoreco la slovenaj kaj kroataj Orel-unuiĝoj de la katolika junularo estas dissolvitaj? Aŭ kion ni scias pri la katolika junularo en Italujo kaj ĝia sinteno al la faŝista ŝtato? Kie restas la aktivigo de kunigita tutmonda forto en la granda batalo pri la laborista kaj kamparana junularo, por la misiado de la mondo en la senco de la direktivoj de la Sankta Patro, por la definitiva certigo kaj bazigo de la paco inter la nacioj, por la liberigo de la kolorhaŭtaj rasoj? Kiel vigle aktiva Juventus Catholica povus okupiĝi pri tiuj urĝaj problemoj kaj taskoj, kaj kiel ĝi povus esti kune kun la Pax Romana de la studentoj kaj kun la Junulina Sekcio de la Internacia Katolika Virina Ligo la plej fidela juna komunumo de la Sankta Patro kaj de la Eklezio Antaŭen, ni komencu! Vivu la junularo de la mondeklezio! Vivu la tutmonda unuiĝo de la katolika junularo! Vivu la Juventus Catholica!» — Georg Wagner estas prava: la katolika junularo tutmonda atendas la reviviĝon de sia granda internacio. Ni ja scias, ke parte la kaŭzoj, kiuj antaŭ jaroj mortigis ĝin, ankoraŭ ekzistas. Sed per bona volo kaj prudenta agado ili devus esti supereblaj. Nia MOKA daŭrigos sian laboron por krei la bazojn en la individuoj, kaj tiom longe, ke J. C. ne funkcios, ni ankaŭ klopodos kiel ĝis nun, servi laŭ niaj fortoj la internacian kunlaboron de la asocioj, kvankam tio ja ne estas nia ĉeftasko. (Pri la evoluo de J. C. vidu la numerojn de aŭgusto 1926, aprilo 1927 kaj aŭgusto 1927 de LA JUNA BATALANTO!) (daŭrigota).



## BOLŜEVISTA JUNULARA MOVADO.

La bolŝevismo klopodas organizi la tutan junularon de Rusujo. Aliaj ol bolŝevistaj junularaj ligoj ne estas permesataj. La bolŝevista junulara agado havas tri ŝtupojn : 1. por infanoj 8 - 12 jaraj la tiel nomataj « oktobraj infanoj ». La fundamenta ideo pri ili estas, ke la infanoj ne apartenas al la gepatroj, sed al la socio. Ilia nombro nun estas proksimume 300 000; 2. Por la infanoj 12-15 jaraj ekzistas la « ruĝaj pioniroj », skolta organizaĵo. Tendenco : plena « liberigo » de la gepatroj, kutimiĝo al komunista tendara vivado, preparo al bolŝevista propaganda kaj agitada laboro, speciale en la vilaĝoj. Nombro : 2 milionoj! 3. La « Komsomol-anoj » 15-23 jaraj. Ili estas la senpera preparejo por la partio. Ili jam helpas en la administra servo, estas ofte la plej kruelaj helpantoj de la rusa terurpolico (GPU, « Ĉeka ») kaj havas la taskon de kontraŭreligia propagando kaj plenan liberecon al demonstracioj la religian senton mokantaj. Ilia nombro povas esti kalkulata je 1 miliono.

P. Cyrill Fischer O. F. M., Vieno (el lia parolado en la X-a IKA-Kongreso, Feldkirch, sept. 1930).

## MODERNA LITERATURO EN ĤINUJO.

Se oni sabate aŭ dimanĉe posttagmeze promenas en la Foochow-Strato de Shanghai, oni povas vidi amasojn da studentoj, kiuj vizitadas la librovendejojn, serĉante sian favoritan literaturon. Kiaj do estas la ĝeneralaj karakterizoj de la nova literaturo, kiu havas tiom da influo al la hodiaŭa ĥina studentaro?

La literaturo de antaŭ 10 jaroj adoris la demokration, la sciencan spiriton kaj la individuismon. Poste venis mallonga periodo, en kiu la modo turniĝis al amo kaj romantikismo. Sed de du jaroj nun manifestiĝas aliaj tendencoj :

1. La nova literaturo estas « proletaria ». Ĝi pentras la vivon kaj la problemojn de la proletariaro.
2. Oni antaŭenmetas la kolektivismon kaj ne la individuismon.
3. Oni montras kaj senindulge kritikas la malfortojn kaj mankojn de la burĝa socio.
4. Oni precipe celas al realismo.
5. La reganta spirito de tiu nova literaturo estas spirito de revolto kontraŭ la ekzistantaj kondiĉoj.

Do hodiaŭ malsamaj kaj interluktantaj influoj atakas la spiriton de la ĥina studento. Studante tiun literaturon oni klare rimarkas unu fakton : la mankon de kristanaj publikigaĵoj. Aŭ almenaŭ, se tiu kristana literaturo ekzistas, ĝi ne atingas la nekristanajn legantojn. La konkludo tial devas esti, ke estas necese kiel eble plej rapide veni al ŝanĝo en la taktiko de la produktado kaj disvastigado de la kristanaj publikigaĵoj. Estas la tasko de tiuj, kiuj posedas la veron, ke ili disvastigu ĝin...

« Les Carnets de l'AUCAM », Louvain.

N I B E Z O N A S **500 novajn abonantojn. Ĉu vi ne volas helpi, gajni ilin por ni antaŭ Kristnasko?**

**Köln.** Radio-paroladoj de nia int. sekr., gvido de eksterlandaj vizitantoj tra Koln, ĝastpartopreno je la Internacia Generala Kunveno de la Junmetiista Unuiĝo kaj je la inaŭguro de ĝia nova domo.

**Miltenberg.** Granda demonstracio kun parolado de August Günther, kun ĉeesto de angla junulara grupo.

**Paderborn.** En la kongreso de la Paca Ligo Katolika Heinz Kolvenbach reprezentis nin. Ĉeestis gastoj el multaj landoj: Anglujo, Aŭstrujo, Belgujo, Ĉeĥoslovakujo, Francujo, Nederlando, Polujo, Usono.

## HISPANUJO.

**Gijon.** Ni ricevis numerojn de «El Principado», bulteno de la Katolika Agado en Gijon, kaj de «El Siglo Futuro» (ĉiutaga jurnalo en Madrid) kun raportoj pri la sukcesa agado de la Astura Esperanto-Asocio, speciale en la katolika junularo. S-ro F. Menendez Rua estas la fervora gvidanto de la Asocio. Msgr. D-ro J. B. Luis Perez, episkopo de Gijon, estas elektita honora prezidanto, kaj okazis solena akcepto en la episkopa palaco, en kiu la episkopo kiel ankaŭ lia eminenta gasto D-ro F. Frutos Valiente, episkopo de Salamanca, pruvis per siaj vortoj sian plenan simpation por Esperanto. Liaj Episkopaj Moŝtoj tre deziras, ke la katolika junularo lernu la internacian lingvon kaj per tio servu la Katolikan Agadon.

## HUNGARUJO.

**Budapest.** Nia int. sekr. partoprenis la Int. Kongreson de la Katolika Universitata Junularo, la Int. Kongr. de la Kat. Laborista Junularo, la kat. Esperanto-kongreson kaj la Int. Konf. por Senalkohola Junulara Eduko. Li havis okazon interparoladi kun nia amiko Pastro Németh kaj kun multaj aliaj geamikoj el multaj landoj. — En la fonda kunveno de la nova landa komitato de la Hungara Centra Asocio de la Katolika Junmetiista Unuiĝo Wilh. Solzbacher faris mallongan paroladon, alportante la salutojn de MOKA, atentigante pri la internacieco de la Katolika Agado kaj pri praktikaj bezonoj de la internacia kunlaboro: eksterlandaj vojaĝoj, korespondado, Esperanto. — En la Kongreso de la Laborista Junularo li faris unu el la ĉefparoladoj. Cetere tio estis la sola ne esperantista kongreso inter la Budapestaj solenoj, en kiu estas energie propagandite por Esperanto. Multaj el la ĉeestintoj, inter ili unu episkopo kaj kelkaj eminentuloj, tre interesiĝis pri la MOKA-movado kaj poste ankoraŭ petis informojn. — En la malferma kunsido de la Esp.-Kongreso W. Solzbacher alportis la salutojn de MOKA kaj de kelkaj aliaj organizajoj, nia amikino Ilona Szabo el Rumanujo salutis nome de la MOKA-grupo «Pax Christi» en Cluj. Kelkaj gvidantoj de la junularo en Hungarujo promesis kunlaboron.

## ĤINUJO.

Nacia Sekretariejo. Kun granda ĝojo ni ricevis el la Vatikano leteron de nia ĝisnuna sekretario P. Joh. Bapt. Kao O. F. M., sciigante, ke li feliĉe, post kvinmonata vojaĝado, alvenis en la Eternan Urbon. Intertempe **Fr. Andreo Chang O. F. M.** en **Tsinanfu** jam konsentis akcepti la postenon de nacia sekretario. Ni esperas, ke ni en li havos same fervoran kaj kapablan reprezentanton kiel ĝis nun en nia kara amiko Kao.

## ITALUJO.

**Roma.** Ni klopodos, ĉu estos eble, veni al bona kunlaboro de niaj tieaj diversnaciaj amikoj.

## JAPANUJO.

**Nacia Sekretariejo.** J. M. Hashimoto akceptis provizore reprezenti nin en tiu lando. Kun intereso vi legos liajn raportojn en J. B.



## JUGOSLAVUJO.

**Beograd.** W. Solzbacher faris paroladon en la Esperanto-Societo. Kelkaj interesitaj amikoj.

**Ljubljana.** La int. sekr. vizitis la urbon. Okazis kunveno de gvidantoj de la katolika junularo (studentoj, laborista junularo, skoltoj), en kiu W. Solzbacher faris paroladon pri la nuna situacio de la germana junulara movado kaj pri la internaciaj taskoj de la junularo. Vizitoj al lokaj gvidantoj.

**Zagreb.** Solzbacher vizitis gvidantojn kaj centrejojn de la katolika junularo, ankaŭ de la Esperanto-movado. Specialan dankon li ŝuldas al D-ro Dušan Maruzzi pro afabla helpo kaj valoraj informoj kaj al ĉefredaktoro D-ro Matulić, kiu bonvolis akompani lin en liaj vizitoj.

Pro politikaj kaŭzoj nun plena evoluiĝo de nia movado en Jugoslavujo (kelkaj junularaj organizajoj katolikaj jam estas ŝtate dissolvitaj, aliaj atendas la saman sorton) ne ŝajnas ebla, sed almenaŭ ni jam povas fari bonan preparan laboron.

## POLUJO.

**Krakow.** La int. sekr. ŝuldas grandan dankon al la Unuiĝo de la Laborista Junularo Katolika, kiu tiel gasteme akceptis lin en sia granda domo, kaj al la patro superioro de la jesuitoj, kiu tiel afable donis al li ĉiujn informojn.

**Lwow (Lviv).** La internacia sekretario de MOKA estis komence de sept. du tagojn en Lwow, por ekinterrilati al la grekkatolika (ukrajna) junularo, sekvante afablan inviton de la katolika ukrajna studenta ligo «Obnova» («Renoviĝo»). Marjan Kozak, estrarano de Obnova, kaj Ivan Czerkavskyj, Esperantista membro de Obnova, bonvolis akompani kaj helpi lin dum la tuta tempo. Li estis gastigita en la seminario. Lia Ĉefepiskopa Moŝto Msgr. Andreo grafo Szeptyckyj, metropolito de la grekkatolikaj ukrajnoj, episkopo Msgr. Buczko, kaj episkopo Msgr. Budka (el Kanado) bonvolis afable akcepti nian sekretarion, interese aŭskulti liajn eksplikojn pri MOKA kaj doni bonajn konsilojn pri kunlaboro de la grekkatolika ukrajna junularo. La episkopoj salutis nian movadon kaj benis ĝin. Posttagmeze okazis en la seminario malgranda interparolado, kiun i. a. partoprenis Pastro grafo R. zewuski, sekretario de Lia Metropolita Moŝto, kaj en kiu W. Solzbacher klarigis sencon, celon kaj labormetodon de nia movado. Oni promesis fervoran kunlaboron, kaj W. Solzbacher promesis, ke en MOKA la katolika frateco devos ankaŭ espримiĝi en frata kunagado kaj komuna apostola laboro de la diversritaj katolikoj. Ni estonte pli atentos la grandan taskon de la apostolado de la orientaj eklezioj. Ankaŭ Patro Peridon, direktoro de la seminario, naskiĝinta nederlandano, bonvolis helpi.

**Sromowce.** En tiu vilaĝo, kiu troviĝas en la plej bela regiono de Polujo, tute proksime ĉe la Tatraj kaj la Peninaj Montoj, la polaj skoltinoj estis disponigintaj sian belan hejmon por internacia konferenco de orienteŭropaj junularaj gvidantoj, kiun la Frataro por Interpacigo organizis sub gvido de nia amiko Kaspar Mayr. Ĉeestis partoprenantoj el Polujo, Latvujo, Rumanujo, Bulgarujo, Jugoslavujo, Ĉeĥoslovakujo, Aŭstrujo, Germanujo, krome gastoj el Francujo, Anglujo, Svisujo, Nederlando, Svedujo kaj Norvegujo. Preskaŭ la duono estis katolikoj, inter ili ankaŭ kelkaj pastroj el Polujo kaj Germanujo. La konferenco, kiu daŭris dek tagojn, donis bonajn instigojn al plua laborado kaj povis helpi por pliklarigi la komprenon pri la treege komplikitaj problemoj de Orienta kaj Sudorienta Eŭropo. Nia internacia sekretario partoprenis kaj havis poste diversloke okazon, raporti pri la konferenco, ankaŭ ĉe kelkaj episkopoj.

## RUMANUJO.

**Nacia sekretariejo.** Okaze de la Katolika Kongreso Transilvania en Cluj (Kolozsvar) kaj de la tiea vizito de la internacia MOKA-sekretario okazis interparoladoj pri nia estonta laboro. Estas formita nacia komitato de MOKA, kies sekretario estas **Simon Csora Asigurare Generala, Cluj.** Provizore apartenas al ĝi Prof. L. Baumgarten (Mercurea-Ciuc), Simon Csora (Cluj), Pastro D-ro Matyas Szallay (Sfântul Gheorghe) kaj Karoly Vigh (Târgu-Mureŝ). Estos aldonataj ankoraŭ grekritaj kunlaborantoj. Oni volas klopodi starigi krome por la MOKA-laboro pli grandan komitaton de delegitoj el ĉiuj junularaj asocioj kaj el ĉiuj nacioj (hungaroj, rumanoj, germanoj, poloj, ukrajnoj, armenoj) kaj landpartoj, krome kompreneble lokajn delegitojn. La protektoro episkopo Majlath kun plena simpatio helpas kaj helpos nin, krome ankaŭ jam la grekrita katolika metropolito de Blaj, la episkopo de Gherla, la ĝenerala vikario de Bukovino kaj la armenkatolika pastraro promesis al nia internacia sekretario, kiu vizitis ilin, sian simpation kaj helpon.

**Alba Julia** (Gyulafehervar). La 14/15 sept. la int. MOKA-sekr. estis tie, por viziti Msgr. Majlath, nian protektoron, la «episkopon de la junularo». Lia Episkopa Moŝto estas kaj restas ne nur granda amiko de nia movado ĝenerale, sed ankaŭ de ĝiaj specialaj agadmetodoj kaj institucioj, kiel Esperanto-propagando, «La Juna Batalanto» ktp. kaj li donacis al nia sekr. sian bildon kun Esperantlingvaj dediĉaj vortoj. Dankon ankaŭ al la du fratoj Labund kaj al la UEA-delegitino F-ino Irma Gyulay pro ilia afabla helpo !

**Blaj.** Nia int. sekr. vizitis tiun metropolon de la rumanaj grekritaj katolikoj. Lia Ĉefepiskopa Moŝto Msgr. Suciu ricevis lin en preskaŭ tuthora aŭdienco, en kiu li aŭskultis kun granda intereso la (itallingvajn) klarigojn pri la MOKA-movado kaj bonvolis doni afablajn informojn pri la situacio en la rumana grekrita katolikismo. Dankon al la metropolita sekretario Pastro Livius Racotian, al la rektoro de la seminario, al la seminariaj profesoroj kaj al la aŭgustenaj monaĥoj! La interparoladoj estis sufiĉe poliglotaj, oni uzis rumanan, italan, francan, anglan, germanan, rusan kaj latinan lingvojn, kaj laŭ speciala invito W. Solzbacher faris al la profesoroj ankaŭ malgrandan paroladon en Esperanto.

**Braŝov** (Kronstadt). W. Solzbacher paroladis antaŭ la saksaj (germanaj) junularaj ligoj (protestantaj, Wandervogel, Blaukreuz, Wehrlaube, Versöhnungsbund) pri la temo « la junularo kaj la paco ». Mathilde Dück gvidis, kaj honore al la gasto oni kantis transilvaniajn kantojn. Ĉar granda parto el la ĉeestantaro estis naciista, la diskutado fariĝis tre vigla. Dankon al pastoro Alfred Hermann pro lia gastemo !

**Cernauti.** W. Solzbacher estis du tagojn en la Bukovina ĉefurbo. Pro bedaŭrinda subita ŝanĝo de lia vojaĝprogramo du paroladoj por la katolika junularo pri la temoj «Roma — Moskva — New York» kaj «Kristo kaj la Junularo de la Nacioj», kvankam jam anoncitaj en la preĝejoj kaj en 5 jurnaloj kaj perfekte preparitaj de la loka UEA-delegito majoro Hasenöhrl, ne povis okazi. Tamen S-ro Hasenöhrl kaj lia afabla edzino multe helpis nian sekretarion, ebligante vizitojn al studenta grupo, pastroj ktp. La ĝenerala vikario de Bukovina Msgr. Grabowski multe interesiĝis pri nia movado, tutkore invitis nian sekretarion, reveni por pli longa tempo kaj tiam aboradi inter la junularo de la ĉefurbo kiel ankaŭ de la vilaĝoj. Adiaŭante li diris: «Revenu certe kaj ne forgesu nin ! Ĉi tie ni malsatas kaj soifas je viaj ideoj kaj via laborado !»

**Cluj.** La int. sekr. estis kvar tagojn en Cluj (Kolozsvar), kaj dank' al la admirinda helpo de nia del. Simon Csora kaj de aliaj geamikoj (ankaŭ la helpema UEA-sekr. Eugenia Morariu estu citata) li povis bone labori, renkontante okaze de la Katolika Kongreso, kiun li ĉeestis, multajn gvidantojn, vizitante redakciojn k. a. Okazis publika parolado bone vizitita pri «la internaciaj taskoj de la katolika junularo» germanlingve kaj kun hungarlingva traduko de S-ro Oswald Herschman. Granda intereso.



— S. Csora komencos novajn Esperanto-kursojn ĉe la skoltoj hungaraj kaj rumanaj, eble ankaŭ en lernejoj, laŭ la Ĉe-metodo. — Grupo «Pax Christi» vigle daŭrigos sian laboron. Oni nun grandkvante abonas J. B.. Specialan dankon al Prof. Gheorghe Cornea pro valora helpo !

**Gherla.** Laŭ afabla invito de Lia Episkopa Moŝto Msgr. Hossu nia int. sekr. vizitis la urbon, kaj dank' al la agema UEA-del. prof. Bela Babos, al la afabla episkopa sekretario pastro Victor Dunca, al la armenkatolika pastro Bertalan Ŝahin kaj al multaj aliaj la vizito estis sukcesa. La episkopo bonvolis inviti nian sekretarion al tagmanĝo kaj promesis sian plenan simpation kaj kunlaboron. Posttagmeze okazis en la instruista preparejo kunveno por rumanoj. Ĉeestis multaj kanonikoj, profesoroj, pastroj, junuloj kaj ĉefe ankaŭ junulinoj. Pastro D-ro Virgil Balibanu prezidis kaj prezentis nian sekretarion, W. Solzbacher paroladis franclingve pri «la internaciaj taskoj de la katolika junularo», kaj pastro Dunca, episkopa sekretario, tradukis en rumanan lingvon. La intereso estis granda, kaj Pastro D-ro Balibanu petos la episkopon, komenciĝi Esperanto-kurson en la seminario. — Vespere okazis kunveno por armenoj, kies centrejo en Rumanujo estas Gherla. W. Solzbacher paroladis germanlingve pri «La katolika Eklezio, la internacia vivo kaj la laboranta junularo», kaj Prof. Matyasovich tradukis en hungaran lingvon. La armenkatolika junularo montris grandan intereson kaj ankaŭ komencos Esperanto-kurson gvidotan de Prof. Babos. La gazetaro atentigis pri la vizito.

**Sibiu.** W. Solzbacher okaze de sia vizito faris paroladon en la Katolika Junvira Unuiĝo pri «La Eklezio kaj la laboranta junularo».

**Timiŝoara.** Nia int. sekr. estis du tagojn en la Banata ĉefurbo kaj ŝuldas grandan dankon al la agema vicdel. de UEA J. Csapo, al la gvidantoj de la germana katolika kleriga domo «Banatia» kaj al multaj amikoj. Li faris du paroladojn: La unua okazis en la Germana Katolika Junularo sub prezido de Pastro Direktoro Nischbach pri «la internaciaj taskoj de la katolika junularo», la dua estis komuna aranĝo de la (hungara Protestanta-Kalvinana Junulara Asocio kaj de la lokaj Esperantistoj kaj okazis en la reformita preĝejo. En ĝi W. Solzbacher paroladis en Esperanto pri «la hodiaŭa junularo kaj la internacia vivo», raportante pri la diversaj internaciaj junularmovadoj, atentigante pri la problemoj kaj bezonoj de la nuntempa junularo kaj donante praktikajn ekzemplojn pri la utiligebleco de Esperanto. Julio Csapo tradukis hungarlingven, kaj okazis vigla diskutado, en kiu partoprenis ĉefe la Esperantistoj, sed ankaŭ la loka protestanta pastoro. En la nomo de la Esperantistoj la katolika seminariano Otto Schojbert salutis nian sekretarion.

## LETERKESTO.

**La internacia sekretario** ankaŭ en ĉi tiu loko tutkore dankas la multajn geamikojn, kiuj dum lia 7-semajna kaj 7000-kilometra vojaĝo helpis lin. Nur kvarfoje mi loĝis en hotelo, ĉiam alie mi estas gasteme akceptita de iu amiko. Ĉiam mi estas renkontita je la stacidomo, ĉiam mi havis afablajn gvidantojn en la plej diversaj urboj, ĉiam la kunvenoj kaj paroladoj estis bonege preparitaj. Dankon, tutkoran dankon al ĉiuj! Dankon al la plej honorindaj ĉefepiskopoj kaj episkokoj, al la seminarioj kaj katolikaj institutoj, al la delegitoj, grupoj kaj membroj, kiuj tiel efike subtenis mian laboron! Dankon al tiuj, kiuj finance helpis! Dankon al tiuj, kiuj savis min en malagrablaj situacioj ĉe limtransiro kaj ĉe la policaj oficejoj! Dankon al tiuj, kiuj peris por mi gravajn rabatojn ĉe fervojoj! Dankon al tiuj, kiuj bonvolis traduki miajn vortojn en hungaran, slovakan, ĉeĥan, polan, ukrajnan, rumanan, serbkroatan kaj slovenan lingvojn! Dankon al la karaj virinoj kaj junulinoj, kiuj penis helpe de lavujo, kudrilo kaj gladilo, por fari el malzorgita mondvaganto civilize aspektantan junulon! Dankon al Esperanto kaj al UEA, kies delegitoj ofte faris al mi gravegajn servojn! Dankon al la katolika junularo de tiuj landoj kaj urboj, kiujn mi vizitis kiu per sia entuziasmo kaj katolika amo permesis, ke mia vojaĝo fariĝis denove, kiel belga amiko kutimas diri, « pilgrimo de la kristana frateco »!

W. S.

---

A B O N U  K A J  P A G U !
P A G U  K A J  A B O N U !
A B O N U  K A J  P A G U !

# El la Espéranto-Movado

**En Oxford** kunvenis 1200 Esperantistoj el ĉiuj partoj de la mondo ĉe la 22-a Universala Kongreso de Esperanto. Oficiale salutis reprezentantoj de kelkaj registaroj. La katolikoj havis diservon, en kiu la prezidanto de la Irlanda Katolika Ligo Esperantista P. Gaffney O. P. predikis, kaj fakkunvenon, en kiu S-ro Heilker el Nederlando prezidis, sed bedaŭrinde ne multaj gesamideanoj ĉeestis. Kelkaj katolikaj Esperantistoj okaze de vizito al la Katolika Laborista Kolegio (« Catholic Workers College») havis okazon prezentiĝi al la jus ĉeestanta epikopo de Hoscham kaj Newcastle.

**En Budapest** 200 gesamideanoj el multaj landoj renkontiĝis en la Katolika Esperanto-Kongreso sub prezido de Pastro Prof. Font-Giralt el Gerona (Hispanujo), prezidanto de IKUE. La solenan malferman kunvenon en la pompa festsalonego de la S. Stefana Akademio ĉeestis ankaŭ du episkopoj, kaj Lia Ĉefepiskopa Moŝto Msgr grafo Zichy de Kalocsa diris tre simpatiajn vortojn. La salutparoladon faris D-ro Kolomano de Kalocsay. Okazis pilgrimo al Mariabesnyœ kaj tie ankaŭ la laborkunsido de la kongreso. Estis anoncitaj Esperanto-paroladoj de Pastro Font-Giralt kaj Prof. Schendeler en la Poliglota Salutkunveno kaj en la Eŭkaristia Demonstracio de la Sankt-Emerik-Solenoj, sed ili pro manko de tempo ne okazis. Sed en la du grandiozaj procesioj la Esperanto-grupoj faris bonan propagandan impreson. D-ro Lukas meritas dankon pro la bonega preparo.

**Skolta Esperantista Ligo** kunveniĝis 80 geskoltojn el Anglujo, Skotujo, Nederlando kaj Norvegujo en tendaro proksime al Nijmegen (Nederlando). En la sekvonta jaro oni intencas aranĝi laŭ oficiala invito de la Hungara Skolta Ligo internacian Esperantistan skolttendaron en Hungarujo. Por sia formota kapitalo SEL jam enspezis pli ol 15 anglajn funtojn (300 RM.).

« **Verda Kruco** », Internacia Esperantista Laborkomunumo de Tabakkontraŭuloj, eldonis efikajn gumarkojn diversteksajn. Ili helpu liberigi la junularon de la tabaksklaveco! Oni petu ilin de la sekretario, nia amiko Walter Mudrak, WIEN VIII., Strozzigasse 19.

**La angla Asocio por la Ligo de Nacioj** voĉdonis favoran rezolucion por Esperanto.

**En Sennacieca Asocio Tutmonda** (SAT), organizajo de revoluciaj (klasbatalaj) Esperantistoj, estiĝis konflikto: Ĝi perdis ĉiujn rusajn membrojn kaj abonantojn, ĉar la rusa registaro ne permesas plu, sendi la monon de la Moskva agentejo al la Pariza centrejo. — Do eĉ al revoluciuloj kaj komunistoj oni montras tian «simpation»! La numeroj de «La Juna Batalanto», kiujn ni sendis al Sovetuio, neniam alvenis, sed ĉiam estas konfiskitaj. Kial tia timo? — Kaj samtempe la Soveta Registaro favoras Esperanton, eldonas oficialajn poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn en la internacia lingvo ktp.

---

# SUR NIA LIBROTABLO

## Recenzejo de novaj libroj de internacia intereso

en Esperanto :

**Roparz Hemon, Esploro pri la situacio de la bretona lingvo** (Enklask Diwar-Benn Stad ar Brezoneg). Libro 1-a de la Internacia Kelta Biblioteko, dulingva (bretona kaj Esperanta), 48 pĝ. + landkarto (multaj landkartoj en la teksto), Eldonejo Gwalarn, Brest, Francujo, 4 fr. (0.75 sv. fr.) 1930.

Kiu sciaŝ, ke en la franca provinco Bretonujo ankoraŭ vivas ĉ. unu miliono da homoj, kies gepatra lingvo estas bretona (kelta)? Hemon esploris tion konstatante, en kiu lingvo oni predikas en la preĝejoj kaj en kiu la katekismo estas instruata. Li cetere estas ankaŭ eldonanto de tre interesa Esperanto-gazeto « Nord-Okcidento », kiu volas krei pli bonan kunlaboron inter la ankoraŭ ekzistantaj keltaj lingvoj : bretona, kimra, gaela (skota) kaj irlanda.



**Prof. D-ro Hermann Nothnagel, La Mortado.** El germ. trad. Bernhard Selzer. Wien 1930, Esperanto-Societo « Progreso » (X., Ettenreichgasse 4/31), 1.— RM, 32 pĝ.

« Pliriĉigo de nia ankoraŭ ne tre ampleksa popular-scienca literaturo » en Esperanto. La aŭtoro estis fama medicinisto.

en flandra lingvo :

**P. van Overzee, De Ziekte aan de Zenne,** Een historische bijdrage tot het nationaliteiten-vraagstuk in het koninkrijk Belgie, 276 pĝ., Brugge 1930, Uitgave « Excelsior ».

La libro estas skizo de la historio de la « flandra problemo » kaj de la flandra movado. La fakto, ke ĝi estas dediĉita al la aktivista gvidanto D-ro Borms, jam montras, ke ĝi tion faras el la vidpunkto de la flandre aŭtonomismo. Ĝi estas interese legebla, skizas la tutan historion de 1830 ĝis 1930 kaj certe havas sian valoron. Sed komprenebIe tia unuflanka vidpunkto ne sufiĉas. Sendube la « flandra problemo » en la lastaj jaroj jam multe proksimiĝis al paca solvo. Kial nei la sincerajn klopodojn faritajn de la « alia flanko » ? — Al tiuj, kiuj deziras ekkoni la idearon de granda parto de la flandra katolika junularo, la libro estas rekomendinda.

en franca lingvo :

**R. P. Janin, Les Eglises séparées d'Orient** (Bibliothèque Catholique des Sciences Religieuses, vol. 95), 12 x 19 cm, 200 pĝ., Paris 1930, Bloud & Gay, 12 fr. fr.

172 milionoj da homoj, inter ili preskaŭ ĉiuj orient- kaj sudslavaj popoloj, apartenas al la skismaj eklezioj de la oriento. Ilia estonteco estas unu el la plej gravaj problemoj por ni, kaj ĉiu klera katoliko devus esti iom informita pri ili. Por tio helpas la libro de la instruita Patro Janin el Konstantinopolo. Ĝi estas ne verkita por fakuloj, sed estas interesa kaj facile komprenebla por ĉiu pastro kaj klera laiko. Ĝi helpu forigi la hontindan nescion ofte trovatan inter ni riate al niaj orientaj fratoj ne jam reunuigitaj kun la Roma Eklezio, sed iam naskintaj la plej glorajn lumojn de la Katolika Eklezio.

en germana lingvo :

**Günther Ehrental, Die deutschen Jugendbünde,** Ein Handbuch ihrer Organisation und ihrer Bestrebungen, Zentral-Verlag, Berlin W 35, 184 pĝ. + 4 grafikaj skizoj, 1929, broŝ 6.— RM, duontolbind. 7.50 RM.

Valora informilo pri la germanaj junularaj ligoj, kiu estonte devos troviĝi sur la labortablo de ĉiuj gvidantoj de junularaj asocioj. La aŭtoro kunportis mirinde grandan materialon pri preskaŭ mil junularaj ligoj, ĉiam publikigante detalojn pri celo, fondo, laŭnombra forteco, adreso de la sekretariejo ktp., krome en la plej multaj partoj la skizo pri la interna kaj ekstera evoluo de la movadoj estas bona. Tamen en du punktoj Günther Ehrental ne tiel bone sukcesis, evidente ĉar li estis nesufiĉe informita : pri la **katolika** junularo kaj pri **internaciaj** junularaj organizajoj. Mi tre bedaŭras, ke mi nur **post** publikigo de la libro persone konatiĝis kun ĝia aŭtoro kaj do ne plu povis eviti la kritikindajojn. Ekz. la longaj informoj pri la Internacia Junulara Lingvo (ILI) jam delonge mortinta estis nenecesaj; kio estas skribita pri la « ĉiujaraj » kongresoj de la Katolika Junulara Internacio, estas nekorekta. Krome eble MOKA estus meritinta pli detalan priskribon ol la kvar liniojn en la libro de Günther Ehrental. Tamen mi estas konvinkita, ke la aldono, kiun li nun preparas, forigos tiujn mankojn, kiuj ja tute ne sufiĉas por plimalgrandigi la signifon de la libro.

**Nissen — Der Rembrandtdeutsche Julius Langbehn.** Von seinem Freunde Benedikt Momme Nissen. 28a-33a milo, reviziita eldono. 8-o, VI + 360 pĝ., 5 bildoj, Freiburg 1929, Herder, tolbind. 7.50 RM.

Nenion ni bezonas aldoni al tio, kion ni diris ĉe la apero de la unua eldono. Legu, lernu, komprenu!

**Delsuc,** Pierre, **Die schwere Nacht von Kerviszell.** Ein Fahrtenabenteuer. Deutsch von **Ernst Drouven.** 8-0, VI + 196 pĝ., Freiburg 1930, broŝ. 2.— RM.

**Cam, Das Auto ohne Rücklicht.** Deutsch von G. A. Lutterbeck. 8-0, VI + 152 pĝ., Freiburg 1930, Herder, broŝ. 2.— RM.

La jesuito Ernst Drouven eldonas novan serion de aventuraj libroj por junuloj : « Fahrtenbücher ». Jen la du unuaj volumoj tradukitaj el franca lingvo. La unua rakontas pri batalo de migrantaj junuloj kun la rusa GPU (Ĉeka), la dua pri stranga aventuro de francaj katolikaj skoltoj kun ilia trupestro, kiu en ĝi ludas la rolon de detektivo. La maniero de la ilustrado kaj speciale de la kovriloj estas tiu de la malbonfamkonataj « skandallibroj ». La libroj volas esti rezulto de speciale « moderna » junulara pedagogio kaj plenumi la bezonon de knaboj en certa aĝo pri aventuraj rakontoj. Mi opinias, ankaŭ esti tre « moderna », tamen ne povas konfesi, ke la libroj trafis sian celon. Komprenebie estas pli bone, ke niaj junuloj legu tiajn laŭ religia kaj morala vidpunkto senriproĉajn librojn ol la konatan skandalliteraturon. Sed ĉu ili lernos diferencigi? Certe la aŭtoro estas prava dirante, ke mankas libroj vere taŭgaj. La konataj piaj kaj piaĉaj sentimentalaj libroj verkitaj de tre piaj, sed tre enuigaj kaj tre maljunaj pastroj, monahinoj ktp. forpelas la junulojn kaj junulinojn sane sentantajn al la detektiv-, kriminal- kaj skandalliteraturo kaj ofte detruas ilian veran religiemecon. Ili bezons legajon vigle, aventure, kuntrenante verkitan, ili bezonas romantikon. Sed ili bezonas **pli**! Kaj tiu « pli » ŝajnas al mi manki en la libroj recenzitaj. Mi pri tio reparolos.

**Herwig,** Franz, **Deutsche Heldenlegende.** 14 kajeroj aŭ 1 resp. du tolbinditaj volumoj. Leks. -8-0, Freiburg 1930, Herder. En unu volumo 10.— RM, en du vol. 6+5.40 RM.

Sed jen libroj, kiujn vi devas doni en la manon de **ĉiu** junulo germanan lingvon komprenanta. Tion li legos kun brulanta kapo kaj tremanta koro, kaj en li kreskos jo el la heroeco, kies alta kanto ostas tiu libro. Kaj la lingvajo! Kiel la muĝado de la marondoj, la murmurado de la riveretoj, la tondro de la montoj kaj denove kiel la malvarmeta vespera vento aŭ la kanto de la birdoj ĝi parolas al la juna homo. La libro kantas pri germanaj herooj de ĉiu tempo. Sed ne pensu, ke ĝi estas glorado de milito kaj militarismo! Ho ne! Vere Herwig estas unu el la malmultaj, kiuj verkis ion **bonan** por junuloj. Mi promesas : Tuj kiam ni havos sufiĉe da loko, unu el liaj heroaj rakontoj aperos en J. B.!

**Collodi — Die Geschichte vom hölzernen Bengele.** Deutsch von Anton **Grumann.** Kun 77 bildoj. 29a - 34a eldono (ĝis nun eldonnombro 82 000). 8-0, XII + 258 pĝ., Freburg 1929, Herder. 2.30 RM, tolbind. 3,50 RM.

Unu el la plej famaj italaj infanlibroj : « Pinocchio » estas la karulo de sennombraj infanoj. Kaj ankaŭ multaj pliaĝuloj ĉiam denove legas en la ĉarma rakonto pri la ligna friponeto. La redaktoro de J. B. devas konfesi, ke li, kvankam jam koninte ĝin de sia knabeco, finlegis ĝin en du tagoj maigraŭ multaj urĝaj laboroj. Pardonu, kara leganto; se vi konus la rakonton, vi farus same...

**Federer,** Heinrich, **Eine Nacht in den Abruzzen.** Mein Tarzisius-Geschichtlein. 67a - 72a milo. 12-o, IV + 68 pĝ., Freiburg 1930, Herder, tolbind. 2 RM.

**Federer.** Heinrich, **Das Wunder in Holzschuhen.** Geschichten aus der Urschweiz. 41a-46a milo. 12-o, IV + 68 pĝ., Freiburg 1930, Herder, 2 RM.

Jam 300 000 libretoj de la svisa pastro-poeto Federer antaŭ nelonge mortinta estas disvenditaj. Ili meritus multajn milionojn da legantoj. Legu kaj legigu!

en a n g l a lingvo :

**C. H. Mckenna, O. P.,** Francis de Vitoria, Founder of International Law. The Catholic Association for International Peace, 1312 Massachusetts Avenue, N. W., Washington, D. C., U. S. A., 16 pĝ., 10 cendoj.

Tiu bonega broŝuro de la amerikana dominikano faras nin katolikojn samtempe fieraj kaj hontantaj: fieraj pri tio, ke unu el niaj plej bonaj teologiistoj estas la vera



fondinto de la Internacia Juro, kaj hontantaj, ĉar ni lasis al nekatolikoj la taskon restarigi la tutmondan famon de Francisko de Vitoria. Al la sekretario de la Carnegie-Fondajo, D-ro James Brown Scott, la Universitato de Salamanca donis la doktortitolon «honoris causa» pro liaj meritoj rilate la konigon de la instruoj de Vitoria, kaj lia tekst-eldono dulingva (latina kaj angla) de «De Indis et de Jure Belli Relectiones» permesas al ni la studadon de la ideoj de la pioniro de la moderna katolika paca movado.

**Denys P. Myers,** Handbook of the League of Nations since 1920, World Peace Foundation, 40 Mt. Vernon Str. Boston Ma. U. S. A., VIII + 320 pĝ., 0.75 dol., 1930.

**Kenneth W. Colegrove,** International Control of Aviation, 1930, 240 pĝ., sama eld. k. pr.

**Philip C. Jessup,** The United States and the World Court, 1929, same.

**Denys P. Myers,** The Reparation Settlement, 1929, same.

**Warren H. Kelchner,** Latin American Relations with the League of Nations, 1929, same

Tiuj publikigajoj de la Mondpaca Fondajo kunmetas en klara kaj praktika maniero la dokumentojn pri la interŝtataj rilatoj, kiujn la interesita laiko bezonas. Mi ĉiam kun granda utilo uzas ilin. Faru same !

en p o l a lingvo :

**Sprawozdanie** z dzialalnosci Sekretarjatu Katolickich Slowianskich Organizacji Akademickich, Warszawa 1930, 32 pĝ.

Interesa skizo pri historio kaj nuna stato de la kunlaboro de la slavaj katolikaj studentaj orgnizajoj. Ni citu pri a langva flanko, ke en la movado ĉiuj slavaj lingvoj estas permesataj kaj ke la **franca** servas kiel helplingvo. (Aliaj interslavaj asocioj uzas germanan lingvon tiucele).

en s e r b a lingvo :

**Zdravlje u poukama i pričama,** Izdanje Jugoslovenskog Društva za čuvanje narodnog zdravlja, Beograd 1930, 192 pĝ., 10 din. jug.

Saneco estas la plej valora tera posedajo de la homo. Ĝian konservadon aŭ regajnon laŭ la individua kiel laŭ la socia vidpunkto celas ĉi tiu libro riĉe ilustrita kaj je kiu plej kompetentaj fakuloj kunlaboris. Kiu scias la lingvon, legu ĝin! Cetere la eldoninta Societo por Popola Saneco korespondas en Esperanto.

K A L E N D A R O J :

**Kalender katholischer Jugend 1931.** Herausgegeben von P. Ernst **Drouven** S. J. kl. 12-0, 416 pĝ., Freiburg 1930, Herder, tolbind. 1.80 Reichsmark.

**Dijaški Koledar za šolsko leto 1930/31,** izdala Slovenska Dijaška Zveza v. Ljubljani, uredil Etbin **Bojc,** Ljubljana 1930, 124 pĝ. + multe da libera papero, 12 din. jugosl.

**Diáknaptár 1930/31.** Erdély és Szlovenszkó ifjusága részére szerkeszti és kiadja a Jóbarát» és a «Tabortüz» ifjusági lapok szerkesztösége. Cluj (Rum.), Str. Kogalniceanu 2, kaj Komarno (Ĉehosl.) Jókai-u. 5, 1930, 210 pĝ., 10 Kč., 50.— Lei.

Rekomendindaj kalendaroj por la katolika junularo! La unua estas treege enhavoriĉa, ekz. ĝi donas la adresojn de ĉiuj germanlingvaj katolikaj junularligoj, montras la insignojn de ĉiuj asocioj katolikaj aŭ nekatolikaj ktp. Pri internacia junulara agado, Esperanto ktp. informas artikolo de la internacia sekr. de MOKA, pri LA JUNA BATALANTO atentigas tutpaĝa anonco kaj diversaj enteksitaj notoj. Vidu la anoncon en ĉi tiu numero! — La dua estas slovena studenta kalendaro, kaj la tria estas hungarlingva skoltkalendaro eldonita komune de grupoj en Rumanujo kaj Ĉehoslovakujo. Ili ĉiuj enhavas utilajn kaj praktikajn informojn, tabelojn, artikoletojn, skizojn ktp.

# Kalender
# KATHOLISCHER JUGEND

für das Jahr **1931.**

---

**GEHALTVOLL**

408 Seiten. Ueber 500 Bilder aus allen Gebieten der Technik und des Wissens.

**BILLIG**

nur 1.80 M., biegsam in Leinen gebunden, Taschen-Format.

**JUNGENHAFT**

das ganze Reich der jugendlichen Interessen wird umspannt : *Rundfunk,* Abenteuer in Eis und Schnee, *Wandern,* Wandertechnik, Verzeichnis aller Jugendherbergen, Fahrt und Kluft, Zeltbau, Uebersicht aller Jugendbünde, *Sport,* Flugzeuge, Entdeckungen usw.

**KATHOLISCH**

in Haltung und Wertung der Dinge, Liturgischer Kalender, *taegliche Kernsprüche.*

**BILDEND UND ANREGEND**

Belehrung aus Physik und Geographie, Ereignisse der Weltgeschichte usw. *Mehrere Preisausschreiben!* Generalpraeses *L. Wolker* und Reichskanzler a. D. Dr *Wilh. Marx* schrieben das *Geleitwort*. Pater *E. Drouven* S. J., bekannt durch seine spannenden Jungengeschichten (Farmerbuben, Nur eine Knabenseele usw.) ist der Herausgeber, unter Mitarbeit *studierender und werktaetiger Jugend* sowie einer grossen Anzahl katholischer *Jugendführer*.
Der «*Kalender Katholischer Jugend*» wird die katholische Jugend bald erobert haben.

---

In den Buchhandlungen vorraetig

**Herder Verlag :--: Freiburg im Breisgau.**

Presejo: Imp. DISONAISE, S. Wirardy, Dison. Tel. 1398.